

Johann Wolfgang von Goethe,  
Heidenröslein

Johann Wolfgang von  
Goethe,  
Dornrozeto

Johann Wolfgang von Goethe,  
Knab' rozeton vidis li

*tradukita de Kálmán Kalocsay*

*tradukita de Joachim Gießner*

Sah ein Knab ein Röslein stehn,  
Röslein auf der Heiden,  
War so jung und morgenschön,  
Lief er schnell, es nah zu sehn,  
Sah's mit vielen Freuden.  
Röslein, Röslein, Röslein rot,  
Röslein auf der Heiden.

Vidis knab': Jen, juna flor'!  
Rozujet' kampara!  
Bela, kiel la aŭror'!  
Li alkuris ĝoje por  
Vidi, kiel kara!  
Rozo, rozo, ruĝa roz',  
Rozujet' kampara.

Knab' rozeton vidis li;  
erikeja floro.  
Juna, bela estis ĝi.  
Por admiru kuris li  
ĝoje kun adoro.  
Rozo, rozo, ruĝa roz',  
erikeja floro.

Knabe sprach: „Ich breche dich,  
Röslein auf der Heiden!“  
Röslein sprach: „Ich steche dich,  
Dass du ewig denkst an mich,  
Und ich will's nicht leiden.“  
Röslein, Röslein, Röslein rot,  
Röslein auf der Heiden.

Diris knab': Mi volas vin,  
Rozujet' kampara.  
Diris roz': Mi boras vin,  
Ĉiam vi memoras min,  
Pro l' dolor' amara.  
Rozo, rozo, ruĝa roz',  
Rozujet' kampara.

Diris knab': „Mi rompos vin,  
vi rozeta floro“.  
Diris roz': „Mi pikos vin,  
ke vi ne forgesos min,  
premas min doloro.“  
Rozo, rozo, ruĝa roz',  
erikeja floro.

Und der wilde Knabe brach  
's Röslein auf der Heiden;  
Röslein wehrte sich und stach,  
Half ihm doch kein Weh und Ach,  
Musst es eben leiden.  
Röslein, Röslein, Röslein rot,  
Röslein auf der Heiden.

Knabo rozon ŝiris do  
De l' rozuj' kampara,  
Ĝi, defende, pikis tro!  
Sed ne helpis ve kaj ho  
Kontraŭ vol' barbara.  
Rozo, rozo, ruĝa roz',  
Rozujet' kampara.

Knab' sovaĝa romp'is ĝin;  
erikeja floro.  
Rozo ja defendis sin  
kaj suferu pikis lin,  
ne utilis ploro.  
Rozo, rozo, ruĝa roz',  
erikeja floro.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 - †1832-03-22).*

*Arg-1022-2069 (2014-05-23 13:04:27)*

*La poemo troviĝas en <http://de.wikipedia.org/wiki/Heidenröslein>. Melodioj estas aŭdeblaŭ en <http://ingeb.org/Lieder/saheinkn.html>.*

*La plej konata Melodio estas tiu, kiun verkis Heinrich Werner. Pri tiu vidu la vikipediejon [http://de.wikipedia.org/wiki/Heinrich\\_Werner\\_\(Komponist\)](http://de.wikipedia.org/wiki/Heinrich_Werner_(Komponist)).*

*Traduko de la Germana poemo "Heidenröslein" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 - †1832-03-22) en Esperanton de KÁLMÁN KALOCSAY (Kalmano Kalocŝajo, \*1911 - †1976).*

*Arg-1022-2226 (2014-12-16 16:56:40)*

*Tiu ĉi poem-esperantigo troviĝas interalie en <http://egalite.hu/kalocsay/eterna/dornrozeto.htm>.*

*Traduko de la Germana poemo "Heidenröslein" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 - †1832-03-22) en Esperanton de JOACHIM GIESSNER (\*1913-12-23 - †2003-11-25).*

*Arg-1022-2225 (2014-12-16 16:29:14)*

*Tiu ĉi kanto-traduko troviĝas en <http://arkivo.esperanto.de/kantoj/kantoj.pdf>.*